

Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2014 numero 2-a: marto-junio 2014
dissendo je la 23-a de aprilo



Foto de Andrée Gacond

Familia migrado



Svisa kalendaro

Ankaŭ vizitu la retan version de la kalendaro prizorgata de Luc Allemand

www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro

Maje

3 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI : Metodika kleriĝo kun Claude Gacond pri la uzo de la instru-afiŝoj.
5 : *Lausanne* : LES-kunveno.
15 : *Zürich* : ESZ-kunveno.
17 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.
18 : *Yverdon* : SES-Ĝenerala Asembleo.
26 : *Basel* : ESB-kunveno.
31 ĝis junio 2 : *Chambéry* : Franca-Kongreso.

Junie

4: *Will* : 50-jara jubileo de la Esperanto-Klubo.
6-9 : *Erfurt (DE)* : Germana E-o-Kongreso.
21 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.
26 : *Basel* : ESB-kunveno.
28 : *Lausanne* : LES-ekskurso en Vicques.

Julie

1 : *Redakta datlimo de SES informas.*
9-16 : *Dinano Bretonio* : 87a SAT-Kongreso.
25 ĝis aŭg. 2 : *Buenos Aires* : 99a Universala K.

Aŭguste

23-30 : *Trento* : 81a Itala Kongreso de Esperanto.
24 aŭ 31 : *Basel* : ESB-ekskurso.

Septembre

1 : *Lausanne* : LES-kunveno kun A. Cherpillod.
3 : *Wil* : EKW-kunveno kun Mireille Grosjean.
6-7 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI : Renkonto kun la verkisto kaj eldonisto André Cherpillod.
13 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.
25 : *Basel* : ESB-kunveno.

OktoBRE

4 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI : Metodika kleriĝo kun Claude Gacond pri la uzo de la instru-afiŝoj.
6 : *Lausanne* : LES-kunveno.
18 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.
23 : *Basel* : ESB-kunveno.

Novembre

15 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.
24 kaj 27 : *Basel* : ESB-kunveno.

Decembre

3 : *Wil* : EKW-rakledvespero
6 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI : Metodika kleriĝo kun Claude Gacond pri la uzo de la instru-afiŝoj.
6 : *Basel* : ESB-kunveno.
13 : *Chaux-de-Fonds* : CDELI-Studsabato.

Organizantoj de kursoj kaj stud-kunvenoj

Basel : *Esperanto-Societo Basel* : PF 178, 4005 Basel, tel : 0049 76 214 57 12.

La Chaux-de-Fonds : *CDELI*, Bibliothèque de la Ville, strato Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds. claude.gacond@ne.ch, tel : 032 967 68 42.

CDELI-Studsabatoj : Aliĝo ĝis la mardo antaŭ la koncerna studsabato ĉe Nancy Fontannaz : Rete: nancy.fontannaz@gmail.com, tel : 021 728 31 27.

Lausanne : *Laŭzana Esperanto-Societo* : CP 246, 1000 Lausanne 22.

www.esperanto-lausanne.ch tel : 021 647 29 28. www.eo-l.ch .

Genève : *Grupo La Stelo* : CP 734, 1212 Grand-Lancy 1, tel : 022 771 24 37.

kaj *Asocio Esperanto-Genève-Régions* : esperantoegr@gmail.com

Neuchâtel : Luc Allemand : luc.allemand@bluewin.ch

Wil : *Esperanto-Klubo* : <http://esperanto.ch/wil>.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils 14,
CH-2300 La Chaux-de-Fonds
Retpoŝto : gacond@bluewin.ch
Tel. : hejme: 032 926 52 32
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:
Nancy Fontannaz, Stefano Keller,
Richard Schneller.

Redaktaj datlimoj

2014-3 : julio-oktobro :
julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.
2014-4 : novembro-decembro :
oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.
2015-1 : januaro-februaro :
decembre 15, dissendo 10-an de januaro.
2015-2 : marto-junio :
februare 10, dissendo 1-an de marto.

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj
079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Marie-Louise Münger, Rue Centrale 4, 2112
Môtiers. Tel. : 032 861 26 28.

Retpoŝto : ml.munger@bluewin.ch

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :
info@esperanto.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Proponis sian helpon :

Sonia Daubercies, Coin d'En Bas 5, 1092
Belmont-sur-Lausanne.

Dieter Rooke, Kreuzimaadweg 20, 3812
Wilderswil

Kontonumero de SES (POSTFINANCE)

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds
17-581908-4
(por kotizoj kaj donacoj)

Konsultu la retejon de SES !

www.svisa-esperanto-societo.ch



Vivo de SES

Redaktis Claude Gacond

Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto Societo SES

Dimanĉe la 18-an de majo 2014

Yverdon-les-Bains, restoracio La Grange (en la blanka Casino)
(Apud la stacidomo)

Prelego de Sinjoro Ramon Perera el Barcelono pri la nuna politika evoluo de Katalunio.

Vizito al «Maison d'Ailleurs», kie estas salono dediĉita al Jules Verne. Tiu ĉi lasta interesiĝis pri Esperanto kaj verkis libron « Voyage d'études », kie la centra utopio estas Esperanto (En la verko « San Carlos »).

Programo

Trajnoj alvenas je la 10h00 proksimume.

10h30 Ĝenerala Asembleo.

12h00 Tagmanĝo (Por la elekto kaj mendo de via menuo vidu la aldonitan folion).

14h00 Prelego pri Katalunio kun posta debato.

15h30 Ekiro al « Maison d'Ailleurs », kiu fermiĝas je la 18h00.

La estraro de SES kore invitas vin kaj esperas je amasa partopreno.

Tagordo de la Ĝenerala Asembleo :

1. Bonvenigo, kontrolo de la ĉeestantoj kaj anonco pri senkulpiĝoj. Anonco pri registrado.
2. Aprobo de la tagordo.
3. Elekto de protokolanto.
4. Elekto de voĉnombrantoj.

5. Evoluo de la membraro.
6. Aprobo de la protokolo de la Ĝenerala Kunveno 2013 (*SES informas* 2013-3, p. 4-8).
7. Vivo de la societo : Aprobo de la Estrar-raporto. (*SES informas* 2014-1, p. 6-11).
8. Konsisto de la Estraro. Elektoj.
9. Raporto de la laborgrupo pri statutmodifoj (art. 3). Eventuale voĉdono pri tio.
10. Financoj. Prezento de la jarkalkulo kaj ties aprobo. (*SES informas* 2014-1, p. 12).
11. Elekto de kaskontrolantoj.

12. Projektoj por 2014 :

- 1) Postsomera kunveno sabate la 6-an de septembro.
- 2) SFERO de la 17-a ĝis la 19-a de oktobro.

13. Projekto por 2015 :

Tutmonda Konferenco pri Instruado de Esperanto kaj subteno de SES.

14. JES (junuloj), SIS (Svisa ILEI sekcio), SAT, SAT-Amikaro, Pasporta Servo k.s. Raportontoj bonvolu anonci sin al Mireille Grosjean antaŭ la kunveno.

15. Buĝeto 2014. Prezento kaj aprobo. (*SES informas* 2014-1, p.12).

16. Diversaĵoj. Tie venu iaj informoj. Tamen tie ni ne povos trakti ion, kiu influas la buĝeton, ĉar ni jam estos aprobinta ĝin.

Proponoj : Ili devis atingi Mireille Grosjean, pf 9, 2416 Les Brenets aŭ rete per mirejo.mireille (ĉe) gmail.com aŭ Dietrich Weidmann ĝis la 26a de februaro 2014.

Proponoj devis esti subtenataj de minimume tri personoj.

-oOo-

Raporto de la kaskontrolantoj

Kunvenis en restoracio de Winterthur-Seen, dato 2014.02.27, je la 16-a horo la kaskontrolistoj Barbara Pochanke kaj Dieter Rooke.

Ili konfirmas, ke la saldoj estis ĝuste transskribitaj, kaj la en- kaj el-spezoj detale kaj akurate registritaj.

Laŭ informo de la kasisto Hans-Werner Grossmann la ŝuldo de KCE intertempe estis repagita.

La konto de „*svisa enciklopedio*“ montras CHF 10.558,53. La responsulo Claude Gacond sugestas likvidi tiun apartan konton kaj transdoni la sumon al SES.

En la jaro 2013 la plielspezoj kalkuliĝis je 11.454 CHF.

La kaskontrolistoj petas klarigon pri la plano de elspezoj.

Kiam konstante deficitas la bilanco, tiam antaŭvideblas la fino de SES.

Subskriboj :

Barbara Pochanke kaj Dieter Rooke, Wilderswil 2014.04.10.

-oOo-



Svisa Familia Esperanta Renkontiĝo

7-a Svisa Feria kaj Familia Esperanto-Renkontiĝo 17-a ĝis 19-a de oktobro 2014 en Vordemwald, Argovio

Jam la 7-an fojon okazos la tradicia renkontiĝo en familia rondo ĉi-foje en la centro Adonio proksime de Zofingo en Argovio. Rezervu jam la datojn. Detalajn informojn kaj la aliĝilon vi trovos en la reto, tuj kiam tio pretos sub : <http://esperanto.ch/sfero>



Ejo de la 7-a SFERO en Vordemwald

Dum la 7a-SFERO okazos la 1-a Svisa Esperanto-Junular-Kantokonkurso. Pliaj informoj aperos baldaŭ en la retejo de SES.

Morto

Funebra ceremonio por Gertrud Eggenberger

En preĝejo de Winterthur-Seen la 27-an de februaro 2014 okazis la solena ceremonio por nia forpasinta membro Gertrud Eggenberger.

Ĉeestis dekopo da esperantistoj, krom la multnombra parenkaro.

Nia samideano Ernst Glättli kortuŝe deklamis poemon en nia lingvo. Triopo emocie kantis tradukitan muzikaĵon el Svedio.

La paroĥa pastro rakontis el la vivo de nia samasociano. Li emfazis ŝian pozitivan sintenon al la mondo kaj aparte menciis ŝian esperantistecon.

Ĉio ĉi estis por mi neforgesebla travivaĵo.

Dieter Rooke.

Svisa vivo

CDELI

Venontaj Studsabatoj

Datoj : 17-a de majo, 21-a de junio, 13-a de septembro, 18-a de oktobro, 15-a de novembro kaj 13-a de decembro. (Mendu kaj diskonigu la detalan informilon)

-oOo-

Venontaj Kulturaj Sabatoj dediĉitaj al metodika formiĝo al la utiligo de la didaktika afiŝaro.

Datoj : 3-a de majo, 4-a de oktobro kaj 6-a de decembro

Tiuj kulturaj sabatoj estas dediĉitaj al la esperanto-instruado per la didaktika afiŝaro. La koncerna instru-materialo estas ege efika komplemento al la tradicia instruado de esperanto, eĉ se ĝia terminaro tendencas emancipiĝi el la terminologia tradicio greklatina, kiu fakte ne konvene priskribas la funkciadon de esperanto. Instruistoj kaj gvidantoj de esperanto-kursoj certe pedagogie **multe profitos el tiuj metodologiaj kulturaj-sabatoj.** Same lernemuloj, kiuj celas perfektigi sin lingve kaj gramatike, per ili multe progresos en sia praktiko de esperanto.

Al la kurs-kotizo de po CHF 20.- por kultura sabato aldoniĝos la kosto de po 10 centimoj por folio je formato-A4, ĉu de la instru-afiŝoj kaj ĉu de la konsilataj ekzercoj.

Tiuj prezoj koncernas la personojn, kiuj antaŭ-anoncos sian partoprenon. Sed tio ne malhelpu la partoprenon al ne-aliĝintoj. Ili simple aldone pagos CHF 10.- por kultura sabato.

Eblas jam konatiĝi kun la menciita didaktika afiŝaro, kaj eĉ mem reprodukti ĝin, tra la kanalo de la retejo www.esperanto-gacond.ch. Sed aldone al la konsulteblaj afiŝoj mankas la necesaj metodikaj konsiloj, kiujn Claude Gacond siatempe parole donis al la pedagogoj, kiujn li didaktike formadis.

Nun realvenis la tempo por pretiĝi al la efika utiligo de tiu instru-afiŝaro. Tial la eblaj interesatoj ekrezervu la menciitajn sabatojn en sia kalendaro kaj sin anoncu tra la kanalo de la retadreso gacond@bluewin.ch.

Ankaŭ parta partopreno eblas. Do kiuj ne povis ĉeesti la unuan renkonton de la 5-a de aprilo (pri kiu ni ĉi-sekve raportas), tiuj tamen bone profitos el la sekvaj sabatoj 3-a de majo, 4-a de oktobro kaj 6-a de decembro.

La venonta sabato 3-a de majo estos des pli interesa, ĉar ne nur Claude Gacond instruos pri la didaktika utiligo de la instru-afiŝoj dum du periodoj, sed ankaŭ profesoro dr. Ilona Koutny prelegos dum du aliaj periodoj. Ŝi estas la gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj kaj de la Finn-Ugra Katedro en la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznan, Pollando. Nepre profitu pri tiu kontakteblo.

Ambaŭ alterne instruos.

Ilona Koutny pritraktos la du temojn :

1) Universitata formado de esperanto-instruistoj. Unika oferto de la Interlingvistikaj Studoj de UAM. Tiu prelego skizos, kion devas scii bona kaj kvalifikita instruisto de esperanto kaj kiel eblas tion akiri. La prelegantino - iama studentino kaj posteulo de prof. Istvan Szerdahelyi en la Esperanto-fako de la ELTE universitato en Budapeŝt, fondinto de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznan, Pollando) - prezentos la universitatan instruadon de interlingvistiko kaj esperantologio en UAM kaj kadre de ĝi la specialan instruistan trejnadon.

2) Instruado de vortoprovizo. La uzo de tem-vortaroj. La vortoprovizo plej efike instrueblas kaj lerneblas en tem-grupoj. La prelegantino - lingvisto, leksikografo kaj lingvo-instruistino - prilumos diversajn rilatojn inter la vortoj kaj kiel tion tem-vortaroj povas prezenti. Interesaj leksikaj kaj komunikaj ekzercoj estos proponataj.

Raporto pri la studa disvolviĝo de la sabato 4-a de aprilo



Jen Claude Gacond prezentanta siajn instru-afiŝojn.

La sabatan matenon 4-an de aprilo Claude Gacond dediĉis al ĝeneralaj konsideroj pri la didaktikaj servoj, kiujn liaj afiŝoj alportas komplemente al la tradicia instruado de esperanto.

Ĉiu afiŝo fakte tre konkrete komprenigas precizan gramatikan aŭ vortfaradan karakterizaĵon en sia tuteco de la lingvo, kaj tiel faciligas tre konkretajn paroligajn ekzercojn.

Tiun enkondukan prezenton Stefano Keller filmis. Tiel baldaŭ ĉiuj interesatoj pri la uzo de la instru-afiŝoj povos spekti tiun filmon, kiu estos kaptebla tra la retejo www.esperanto-gacond.ch ĉe la indeksa punkto *didaktika afiŝaro*. Tiel ĉiuj povos profiti pri la koncernaj ĝeneralaj enkondukoj, kiuj vekis la intereson kaj debatemon de la partoprenantoj.

Posttagmeze sekvis tre praktika prezento de la pedagogia profito de la instru-afiŝoj per la laŭtleĝo de la sekva konversacio inter Claude Gacond kaj Henri Dognac :

Pri la perafiŝa didaktiko paroliga

Unua pedagogia diskuto de Claude Gacond kun Henri Dognac

Henri Dognac.- Obeante tre fidele al viaj klarigoj mi prezentis esperanton al grupeto da interesatoj helpe de via enkonduka kurso por tutkomencantoj. Kaj mi miris pri la sukceso de tiu maniero tuj paroligi esperanton per bildaro plaĉa. Fakte senpene ĉiuj rimarkinde bone asimilis la vortojn kaj frazetojn, kiujn tiuj bildoj instruis. Kiam posttagmeze ni alvenis al la konkludaj frazaj ekzercoj, mi vere miris, ke sen aldono de gramatikaj klarigoj, ĉiuj partoprenantoj ilin bone komprenis. Fakte ĉiuj miris, ke per simplaj rimedoj esperanto kapablas esprimi kompleksajn frazojn. Konklude pluraj parto-prenantoj esprimis la deziron daŭrigi tiun studon de esperanto.

Claude Gacond.- Mi ĝojas pri via instru-sukceso.

Henri.- Ni diru pri la sukceso de via enkonduka perbilda kurso.

Claude.- Jes, sed se vi fakte sukcesis kaj vekis la entuziasmon de viaj instruatoj, estas certe pruvo, ke vi fidele observis la instru-konsilojn sen aldoni plusajn klarigojn.

Henri.- Jes, mi min bone pretigis per atenta antaŭleĝo de viaj instru-klarigoj. Sed nun mi troviĝas en malfacila situacio : kiel plue instrui esperanton al la interesatoj. Kiel multaj aliaj kurs-gvidantoj, mi ofte konscias, kiom mankas al mi metodika formiĝo. Kiel la plimulto de la kurs-gvidantoj mi estas improvizanto sen vera metodologia formiĝo en mia pedagogio. Dum via nun pli ol duon-jarcenta kariero de esperanto-instruisto vi akiris sciojn, kiujn mi kaj certe aliaj kolegoj ŝatus koni por kapabli pli efike instrui esperanton. Plurfoje mi vidis vin utiligi afiŝojn por paroligi kursanojn, kaj mi ŝatus ricevi orientiĝon pri la uzo mem de tiu instru-materialo, kiun mi konstatis ege efika, kaj kiun ĉiu interesato povas konsulti kaj eĉ kapti tra via retejo www.esperanto-gacond.ch ĉe la indeksa punkto *didaktika afiŝaro*. Vi bonvolu klarigi

al mi la didaktikan funkcion de tiu afiŝaro, kiun, kiel mi konstatis, atente konservas kaj rekonsultas la lernantoj dum la sekvo de via instruado.

Claude Gacond.- Tiu didaktika afiŝaro ja rezultas el multaj metodikaj analizoj. Ili celas la tujan paroligon de la kursanoj, ekde la unua leciono, kaj komprenigas al ili, ke esperanto lingve internacias ne per la konsisto mem de sia leksiko, kiu estas okcidenteca, sed per sia gramatika kapablo esprimi divers-maniere penson, respegulante tiel la diversecon mem de la parol-uzoj propraj al ĉiuj lingvo-tipoj.

H.- Ĉu, tiurilate, vi povus alporti precizan ekzemplon ?

Cl.- Jes, volonte ! Tion mi faros per la afiŝo *Famili-nomo*, kiun mi uzas enkonduke al la instruado de esperanto por tuj paroligi la kursanojn. Jen tiu afiŝo vere enkonduka al la instruado de esperanto :

Famili-nomo

Kiu estas via nomo de **familio** ?

Kiu estas via nomo **familia** ?

Kiu estas via **familia** nomo ?

Kiu estas via **familio-nomo** ?

Kiu estas via **familionomo** ?

Kiu estas via **famili-nomo** ?

Kiu estas via **famili-nomo** ?

- Mia nomo de **familio** estas Cseh.

- Mia nomo **familia** estas Baghy.

- Mia **familia** nomo estas Privat.

Pere de tiu afiŝo *Famili-nomo* mi komprenigas du gravajn ecojn, kiuj propras al esperanto. Unue, ke en esperanto preciza demando formuleblas diversmaniere ; kaj due, ke ĝentileco konsistas el respondado respektema al la lingvo-uzo de la demandinto.

H.- Ekzamenante vian afiŝon mi tuj konstatas, ke vi skribis dufoje la nomojn *familio-nomo* kaj *famili-nomo* kun kaj sen divido-streko.

Cl.- Jes, ĉar mi tiel klare montras al la instruatoj, ke ambaŭ skrib-ebloj ĝustas. Kontraŭe la tradicia lernolibra kutimo tendencas reliefigi nur unu el la skrib-formuloj, ĉu kun, ĉu sen streko. Same tiu afiŝo reliefigas, ke esperanto kulturas plurecon de ideo-formulado, kontraŭe al la naciaj lingvoj, kies tendenco estas konsideri kiel ĝusta nur unu-nuran pens-diron, kiun lernantoj devas nepre parkeri, se ili volas sin konvene esprimi. Nacilingve aliaj eblaj dir-manieroj estus ĝenerale nekonvenaj.

H.- Vere interesas min, kiel vi prezentas tiun afiŝon al viaj kursanoj.

Cl.- Mi min simple prezentas montrante sur la afiŝo la respondan frazon « - Mia nomo de *familio* estas Cseh. » dirante : « Mia nomo de *familio* estas Gacond. » kaj poste mi turnas min al kursano montrante kaj legante la unuan demandan frazon : « Kiu estas via nomo de *familio* ? » kaj tuj, kiel orkestrestro, per ambaŭ manoj mi

instigas ĉiujn kursanojn ripeti kun mi tiun demandon : « *Kiu estas via nomo de familia ?* » Ĉiu kursano ricevis kaj fiksis al sia vesto ŝildeton kun la propraj nomoj familia kaj individua. Mi helpas la demanditon respondi : « *Mia nomo de familia estas Aaa.* » montrante al li la suban respondon « - *Mia nomo de familia estas Cseh.* », kiun mi mem estis uzinta. Kaj tuj poste mi turnas min al sekva kursano montrante la duan demandon kaj dirante : « *Kiu estas via nomo familia ?* » koruse ripetigante la demandon al la aliaj kursanoj. Kaj montrante la respondan frazon « - *Mia nomo familia estas Baghy.* » mi helpas la demanditon respondi : « *Mia nomo familia estas Bbb.* » Mi tiel daŭrigas la demand-respondan ekzercon per la sekvaj proponitaj frazoj :

Kiu estas via familia nomo ?

Kiu estas via familio-nomo ?

Kiu estas via familionomo ?

Kiu estas via famili-nomo ?

Kiu estas via familinomo ?

Mi ĉiam ripetigas koruse la demandon al ĉiuj kursanoj kaj instigas la demanditon respondi per formulo respektama al la demanda frazo :

Mia familia nomo estas Ccc.

Mia familio-nomo estas Ddd.

Mia familionomo estas Eee.

Mia famili-nomo estas Fff.

Mia familinomo estas Ggg.

H.- Do vi efektivas tiun paroligon sen intervenigi nacilingvan tradukon.

Cl.- Jes, sen iu ajn nacilingva traduko tre rapide ĉiuj kursanoj komprenas, ke esperanto posedas diversajn eblojn por esprimi saman demandon kaj ke la demando estas invitata respondi respektame al la demanda formulo.

H.- Mi konstatas, ke cetere estus malfacile traduki nacilingven tiun demando-vicon.

Cl.- Tiu nacilingva tradukado estus eĉ absolute neebla. Kaj vi konsciu, ke samtempe tiu demand-responda ekzerco instruas klare prononci ĉiujn vokalojn **a, e, i, o, u** proprajn al esperanto kaj klare prononci la vokal-kombinojn **i-a, i-o, i-u** kun akcento sur la **i**-vokalo kaj por ĉiu vorto akcenti la antaŭ-lastan silabon : **Kiu estas via nomo familia ?**

H.- Do, mi konstatas, ke tiu afiŝo ne nur instruas vicon da demandaj kaj respondaj formuloj, sed ankaŭ havas paroligan rolon tre precizan.

Cl.- La afiŝo *Famili-nomo* eĉ ekintimigas la kursanojn kun la nomoj de esperanto-verkistoj kiel **Cseh, Baghy** kaj **Privat**, kies poemoj aŭ noveloj baldaŭ ebligas unuajn legajn kaj struktur-ŝanĝajn ekzercojn. Tiurilate la unua beletra teksto, kiun mi ekuzas, estas la fama poezieca novelo *Tamen perdota* de Edmond Privat.

H.- Ĉu ne tro malfacila teksto ?

Cl.- Ne temas pri tuja legado de la tuta novelo, sed unue nur pri enkonduka eklego de la unua pens-unuo aŭ propozicio de la novelo : « *Odoras akre brulo pina.* »

H.- Kiel vi enkondukas la legadon de tiu unua frazo de sufiĉe longa novelo ?

Cl.- Afiŝo kun la portreto de Edmond Privat, kiu estis farita en 1908 okaze de lia unua vojaĝo en Usono, prezentas la unuan paragrafon de la novelo *Tamen perdota*, kiun li fakte verkis en Ameriko. Ĉiu kursano ricevas specimenon de tiu dokumento, kiu unue ebligas demandi : « *Kiu estas la familia nomo de tiu homo ?* Post korusa ripeto de tiu demando « *Kiu estas la familia nomo de tiu homo ?* » mi helpas la kursanojn respondi : « *La familia nomo de tiu homo estas Privat.* » Kaj tuj poste mi riskas novan demandon : « *Kiu estas la individua nomo de Privat ?* » Kaj tiel ni alvenas al la respondo : « *La individua nomo de Privat estas Edmond.* »

H.- Interese ! Do vi ne tuj eklegas la tekston.

Cl.- Ho ne ! Unue ni profitu informiĝi pri la nomoj individuaj de la kursanoj anstataŭante la vorton *familio* de la afiŝo *Famili-nomo* per la vorto *individuo*. Tio donas la demando-vicon :

Kiu estas via nomo de individuo ?

Kiu estas via nomo individua ?

Kiu estas via individua nomo ?

Kiu estas via individuo-nomo ?

Kiu estas via individuonomo ?

Kiu estas via individu-nomo ?

Kiu estas via individunomo ?

Tiel la kursanoj pli intime reciproke konatiĝas ekuzante la afiŝon *Famili-nomo* por alitipa struktur-ŝanĝa ekzerco.

H.- Kaj kio pri la teksto *Tamen perdota* ?

Cl.- Kia senpacienco ! Bona pedagogo ĉiam atentu, ke efika instruado evitas ĉian urĝemon ! Trankvila antaŭeniro en la instruado eĉ havas la avantaĝon vekti la intereson kaj senpaciencon de la lernantoj. Nun la afiŝo *Famili-nomo* ebligas diversmaniere rediri la unuan pens-unuon « *Odoras akre brulo pina.* » de la novelo *Tamen perdota* de Edmond Privat : Tiucele ekzerco-folio povas utili. Ĝi konsciigas la kursanojn pri la simileco de la formulo « *brulo pina* » kun la formulo « *nomo familia* » de la afiŝo *Famili-nomo*. Sur tiu folio struktur-ŝanĝe paralelas ambaŭ formuloj :

Odoras akre	brulo pina.	Kiu estas via	nomo familia ?
Odoras akre	brulo de pino.	Kiu estas via	nomo de familio ?
Odoras akre	brulo pina.	Kiu estas via	nomo familia ?
Odoras akre	pina brulo.	Kiu estas via	familia nomo ?
Odoras akre	pino-brulo.	Kiu estas via	familio-nomo ?
Odoras akre	pinobrulo.	Kiu estas via	familionomo ?
Odoras akre	pin-brulo.	Kiu estas via	famili-nomo ?
Odoras akre	pinbrulo.	Kiu estas via	familinomo ?

H.- Kaj pri la kompreno de tiu frazo, kio okazas ?

Cl.- Post tiu struktur-ŝanĝa ekzerco, kiu ree ebligis klare koruse laŭtlegi la koncernajn pli malpli samsignifajn dirojn, alvenas la momento konsulti per **esperanto-nacilingva vortaro** la signifon de la vort-elementoj *odor as akr e brul o pin* kaj *a*. Estu tiom da vortaroj, kiom da malsimilaj lingvanoj en la studgrupo. Grupa laboro estas konsilinda. Jen ekzemple, kion povos tiel malkovri franc- kaj german-lingvanoj per la konsulto de esperanto-franca kaj esperanto-germana vortaroj :

odor/i	<i>avoir une odeur, sentir</i>	<i>Duften</i>
As	<i>terminaison verbale qui marque l'indicatif présent</i>	<i>Als Zeitwortendung bezeichnet die Gegenwart</i>
akr/a	<i>vif (air), âcre, pénétrant</i>	<i>Scharf, spitz, heftig</i>
E	<i>terminaison des adverbes dérivés</i>	<i>Endung des Umstandswortes (Adverb)</i>
brul/i	<i>brûler, être en feu</i>	<i>brennen (in Flammen stehen)</i>
O	<i>terminaison des substantifs</i>	<i>Endung des Hauptwortes</i>
pin/o	<i>pin</i>	<i>Kiefer, Föhre</i>
A	<i>terminaison des adjectifs</i>	<i>Endung für das Beiwort</i>

Tiu vortsignifa esploro pervortara iel malkovrigas al la lernantoj, ke en esperanto la vortoj ĝenerale konsistas el du elementoj. La unua estanta portanto de la vort-signifo kaj la dua alportanta gramatikan informon. La kursanoj havas tiel la eblon malkovri, ke la kvar vortoj *odoras, akre, brulo* kaj *pina* aperas en la vortaro sub la formo *odor/i, akr/a, brul/i* kaj *pin/o*. Ili ankaŭ malkovras, ke la signifo de la finaĵoj *as, e, o* kaj *a* estas trovebla en la vortaro. Afiŝo titolita **Kantema**, kiun la kursanoj ricevos en sekva leciono, klarigos al ili tiun lingvan fenomenon per tre simplaj vortoj. Tial en la nuna momento neniel indas perdi tempon por alporti klarigojn pri leksikaj karakterizaĵoj propraj al esperanto. Tio baldaŭ senpene efektiviĝos parolante en esperanto mem dank'al la afiŝo **Kantema**.

H.- Vi vekas mian intereson pri la sekvo de la laboro. Do la traduko de tiu frazo *Odoras akre brulo pina* efektiviĝas per la uzo de esperanto-nacilingva vortaro, kiu fakte alportas la necesajn indikojn signifajn kaj gramatikajn.

Cl.- Provante traduki tiun frazon la kursanoj necese serĉas, kie situas la verbo kaj la subjekto en la pens-unuo. Kaj ili mire malkovras, ke kontraŭe al la nacilingvaj kutimoj la verbo situas komence de la pensunuo kaj la subjekto en fina pozicio. Tiam tuj kuna efektivigo de struktur-ŝanĝa ekzerco bonvenas. Ĝi ebligas diri la koncernan frazon *Odoras akre brulo pina* divers-maniere, kaj ĉiu lingvano havas tiel la eblon malkovri fraz-formuladon, kiu iel koincidas kun ebla nacilingva traduko. Sed ni evitu perdi tro da tempo al traduk-laboro. Plej gravas komprenigi la proksimuman signifon de la originala frazo de Edmond Privat helpe de diro iel kongrua al la nacilingva vortumado. Nek en la franca, nek en la germana, frazo komenciĝas per verbo kaj finiĝas per subjekto, kiel en la propozicio *Odoras akre brulo pina*. Tio kondukas la kursanojn tuj kompreni la malsimilecon de la esperanto-gramatiko kun tiu de la nacilingvoj. Nacilingvano pensas nur laŭ striktaj vortumoj propraj al sia lingvo. Lernante esperanton li tuj ekzerciĝu esprimiĝi tre diversmaniere. Jen do la ekzerco-folio, kiun mi disdonas al la kursanoj :

Odoras akre brulo pina. Odoras brulo pina akre. Akre odoras brulo pina. Akre brulo pina odoras. Brulo pina odoras akre. Brulo pina akre odoras.	Odoras akre brulo de pino. Odoras brulo de pino akre. Akre odoras brulo de pino. Akre brulo de pino odoras. Brulo de pino odoras akre. Brulo de pino akre odoras.	Odoras akre pinobrulo. Odoras pinobrulo akre. Akre odoras pinobrulo. Akre pinobrulo odoras. Pinobrulo odoras akre. Pinobrulo akre odoras.
--	--	--

H.- Mi ne imagis, ke ekzameno de simpla kvar-vorta frazo povas konduki al tiuj bazaj klarigoj pri la gramatika fleksebleco de esperanto. Verŝajne franclingvano baziĝos sur la formulo « *Brulo de pino odoras akre.* » por ĝin francigi.

Cl.- Siaflanke germanlingvano baziĝos sur la formulo « *Pinobrulo odoras akre.* » por sia traduko. Fakte tiu kvazaŭ demonstra analizo de la riĉeco de la esprimeblo propra al esperanto helpas la lernantojn tuj kompreni, ke esperanto vortare kaj gramatike estas memstara lingvo funkcia alimaniere, ol la eŭropaj nacilingvoj, kvankam el ili ĝi ĉerpis sian leksikon. Neniam la tradicia per-traduka didaktiko kondukas al tia malkovro. Anstataŭ reale instrui la funkciadon de esperanto la per-traduka instruado nur instruas lingvo-strukturojn tradukeblajn nacilingven, ĝi ne instruas esperanton, sed esperanto-dialekton tradukeblan en la propran lingvon. Tial franclingvanoj ekzemple lernos diri « *Mia nomo de familio* » dum la germanlingvanoj lernos « *Mia familionomo* ». Kontraŭe la didaktiko, kiun mi praktikas kaj konsilas, tuj ekde la unua leciono konfrontigas la kursanojn al la vera esperanta lingvo, kaj ne kun simpla ombro de la propra naci-lingvo. Kiam oni instruas al plurlingva grupo, tiam oni tuj malkovras la avantaĝon de didaktiko paroliga kaj la malavantaĝon de didaktiko pertraduka. Ni lasu la lernanton mem malkovri, kio en esperanto similas al la propra lingvo, kaj kio malsimilas al ĝi. Tiel li intimiĝas kun aliaj lingvo-uzoj. Tio povos lin helpi pli facile lerni aliajn naciajn lingvojn.

H.- Ĉu ĉion tion vi instruas en la unua leciono ?

Cl.- Ne necese. Gravas trankvile antaŭen-iri laŭ la asimila kapablo de la kursanoj kaj atenti, ke per la proponitaj struktur-ŝanĝaj ekzercoj ĉiu akiru unue konvenan prononcon kaj malkovru la proprecon mem de esperanto. Kaj kiel vi konstatos, reveno al la afiŝo ***Famili-nomo***, kaj poste al aliaj afiŝoj, kondukos al novaj malkovroj ĝenerale entuziasmigaj por la kursanoj. Kaj tio sen aldono de instru-klarigoj.

H.- Pri la ceteraj afiŝoj mi estas ege interesata.

Cl.- Jes, en venontaj rendevuoj mi iom post iom prezentos tiujn afiŝojn kapteblajn tra mia retejo www.esperanto-gacond.ch kaj ilian didaktikan uzon. Vi konstatos, ke ĉiu afiŝo havas precizan celon paroligan kaj analizan. El tio ilia sukceso.

H.- Ĉu ili anstataŭas lernolibron?

Cl.- Ne necese! Ili ĉefe rolas kiel komplementon pedagogian al aliaj instru-rimedo kolektivaj kaj individuaj. Kiel vi konstatos, ĉiu afiŝo plenumas duoblan rolon : komprenigi ĝeneralan lingvo-fenomenon ne nur propran al esperanto mem, sed ankaŭ pli malpli kaŝe ekzistantan en ĉiuj lingvoj, kaj vekti la parolan uzon de la lernata lingvo.

En la venonta sabato 3-a de majo ni progresos en tiu instru-praktiko

Tiam per instru-klarigaj dialogoj Claude Gacond plue alportos tre gravajn klarigojn pri la reala funkciado de esperanto kaj pri la maniero tion instrui.

Kaj iom post iom dank'al la kunlaboro de Stefano Keller liaj dialogoj estos relegeblaj kaj aŭdeblaj tra la rubriko dediĉita al la instru-afiŝaro de la retejo www.esperanto-gacond.ch.

Esperable multaj profitos tiun okazon perfektigi lingve kaj didaktike, kaj samsabate renkontigi kun Ilona Koutny el Poznan en Pollando.

-oOo-

Septembra semajnfino kun André Cherpillod

La semajnfino 6-an kaj 7-an de septembro nia preleganto estos la verkisto kaj eldonisto André Cherpillod, kiu verŝajne prelegos en esperanto la sabaton 6-an de septembro kaj franclingve kaj esperanto la dimanĉan matenon 7-an de septembro.

La detala programo de ambaŭ tagoj aperos en la aŭgusta bulteno *SES informas* 2014-3. Sed interesatoj jam rezervu la koncernajn sabaton kaj dimanĉon. La sabato disvolviĝos en CDELI mem, la dimanĉo renkontigos nin en alia loko en migra etoso, dum kiu ĉiuj havos la okazon raporti kaj diskuti pri la propra partopreno en la someraj kongresaj renkontoj.

Nepre notu tiujn du renkonteblojn en via agendo. Ekzistas unikaj momentoj, kiujn oni ne maltrafu !

-oOo-

Svisa ILEI-Sekcio

Protokolo de la ĝenerala asembleo de Svisa ILEI-Sekcio (SIS) 26an de oktobro 2013 en *La Grande Ourse*, La Chaux-de-Fonds

Ĉeestis : Mireille Grosjean, prezidanto kaj sekciestro, Jean-Thierry von Büren, vicprezidanto, François Randin, sekretario kaj kasisto, Nancy Fontannaz kaj Luc Allemand.

Senkulpigis : Nicole Margot kaj Dietrich Weidmann.

Mireille Grosjean malfermis la asembleon je la 13a horo salutante la ĉeestantojn.

Membraro : Ĉijare nia sekcio nombras 12 membrojn. Jean-Noël Friot kaj Véra Zaslowski demisiis fine de 2012. Monika Molnar preferas membriĝi en la hungara sekcio. Luc Allemand translokiĝis al Neuchâtel. Sébastien Moret deziras membriĝi ekde 2014. Li loĝas en Lausanne.

Financoj 2012-2013 :

Poŝtfinanca konto 23-20707-8 (Kotizo SIS 2013 : CHF 35.-)

Pagita kotizo 2013 al ILEI : CHF 405.-

Saldo je la 2013.01.01 : CHF 459.60.

Enspezoj (kotizoj) : CHF 350.-

Elspezoj (taksoj) : CHF 37.50.

Saldo je la 2013.10.25 : CHF 763.10.

ILEI-a kotizo pagota por 2013.

CDELI-a fakturo ricevota kaj pagota pro aĉeto de PIV por Nepalo.

Komitato de SIS kaj rilato kun ILEI :

En 2013 Mireille Grosjean prezidas kaj sekciestras SIS kaj tiel reprezentis nian sekcion ene de ILEI. Jean-Thierry von Büren vicprezidis kaj François Randin respondecis kiel sekretario kaj pri la librotenado.

Ĉijare Mireille Grosjean estis elektita prezidanto de ILEI. Ni gratulas ŝin por tio.

La asembleo reelektas unuanime la komitaton por ties respondecoj.

Instruado en Svislando :

Kursoj estas regule organizataj en CDELI kaj en diversaj grupoj, kiel en Laŭzana Esperanto-Societo (LES). Somere tiu societo denove ĉeestis kelksabate en bazaro por varbi.

Lernado per la reto :

Krom *lernu.net* kaj *esperanto.net*, kursoj estas proponataj tra skajpo : ekzemple François Randin tiel instruas al iuj en Kebekio kaj Francio.

Bezono, deziroj en Svislando :

IPR estas sendita ĉu rete ĉu papere. Mireille Grosjean enketos por malaltigi la kotizon de la surretaj legantoj.

Helpo al Nepalo :

SIS donacis *PIV-on* al Nepalo. La kasisto atendas la fakturon de CDELI.

Diversaĵoj : Luc Allemmand anoncas sian translokiĝon al Neuchâtel.

La prezidantino fermas la asembleon je la 14-a horo.

Protokolis François Randin.

-oOo-

ILEI raportas

Jen raportas la prezidanto Mireille Grosjean pri la lasta trimonata agado : 2014.01.15 ĝis 2014.04.15.

Revuoj

Nia organo *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR) estas objekto de plej granda atento kaj de la redaktoro Jozefo Nemeth kaj de mi, kaj de tri tre zorgemaj korektantoj : Luigia Oberhauch Madella, Luiza Carol kaj Rob Moerbeek. Jes ja, fakte nia revuo devus esti lingve perfekta, estante la organo de Ligo de instruistoj ! Plie ĝi devus esti enhance interesa kaj lertiga por kontentigi nian membraron. Ĝi devus havi pli allogan aspekton, pri tio ni estas en pripensoj kaj preparoj.

Nia revuo *Juna Amiko* (JA) travivis novan elanon fine de 2013 kaj nun atingis belan nivelon danke al la klopodoj kaj kapabloj de sia redaktoro Stano Marcek. Menciindas la bona laboro de la tuta skipo de JA, kiu atingas la nombron de 13 personoj. Mi

aŭdas multajn laŭdojn pri tiuj buntaj kajeroj, kies enhavo allogas ne nur infanojn. Plie ni konstatas alvenon de pluraj novaj abonoj. Pozitiva signo ! Ni esploros en Montevideo pri salto al kvar numeroj jare. Venis nova redaktoro, nova presloko, novaj prezoj pli malaltaj.

-oOo-

47-a Konferenco 2014 en Urugvajo

Intensaj preparlaboroj okazas nun printempe, faritaj de Loka Konferenca Komitato (LKK) sub la gvido de Sonia Risso en Montevideo kaj de nia estrarano Radojica Petrovic. Dum kelkaj tagoj li estis en Sud-Ameriko kaj laboris pri diversaj aspektoj de tiu evento kun la LKK. Ana Montesinos de Gomis kiel komisiito de ILEI pri tiu Konferenco akompanis lin kaj efike subtenis la grupon cele al glata disvolviĝo de nia kutima kulmina kunveno ĉiujara. La tagordo de la komitat-kunsidoj kreskas kaj kreskas : ni ne ripozos en Montevideo ! Sed tiu ĉiujara kunveno estas ege grava por la vivo de nia establo : Nia Konferenco malfermos la jubilean jaron Esperanto-Unesko, 60-jariĝo de la unua Rezolucio de Unesko favora al Esperanto. Signifoplena loko, signifoplena dato ! Jam okazis grava atingo : la Konferenco okazos sub la aŭspicioj de la nacia urugvaja Unesko Komisiono, de la ministro pri Kulturo kaj Edukado kaj de la ministro pri Turismo kaj Sporto. La peto pri aŭspicioj de la Internacia Unesko estis sendita al la pariza sidejo.

Bunta programo estas en preparo. Simpozio okazos.

La estraro decidis pri du novaj Honoraj Membroj. Tiu decido estos konfirmita de la Komitato en Montevideo mem. Do neniu plia informo venas nun.

La estraro de UEA kunsidos en Montevideo paralele kun nia evento.

-oOo-

48a Konferenco 2015 en Belgio

Ĝi okazos en Oostende, Belgio, antaŭ la centa UK en Lille, Francio. La salto de unu evento al la alia eblos en du horoj da trajnveturado. Loka Komitato naskiĝis, kontrakto estas subskribita. En aprilo 2014 Radojica Petrovic kunvenos kun LKK en Oostende kaj renkontos la urbestron.

-oOo-

Vivo de la Ligo

Ni finis la reviziadon de la laborkomisionoj kaj de la scienca komitato de IPR.

-oOo-

Kresko

Komence de la jaro 2014 ILEI havis piedon en 60 landoj per adiciado de la sekcioj (35), de la reprezentantoj (12) kaj de la kontakt-personoj (13). Preparlaboroj okazas nun cele al voĉdono pri tri novaj sekcioj en Montevideo ; temas pri sekcioj en Hispanio, Kongo RDC kaj Irano.

-oOo-

Retejoj

www.ilei.info estas nia ĉefa komunikilo. Ĝi ne estas perfekta, tamen Jozefo Nemeth kaj mi daŭre provas kompletigi ĝin kaj plibonigi ĝin. Pliaj modifoj kaj aldonoj estas planitaj.

Pri www.ilei-mondo.info venos granda laboro.

-oOo-

Tutmonda kolokvo pri Instruado de Esperanto, 13-16-ajn de majo 2015 en Svislando

La unuan de marto mi lanĉis la informon al la Esperanto-mondo. La preparlaboroj bone progresas. La du lokoj estas rezervitaj : en Neuchâtel en la Universitato, en La Chaux-de-Fonds en la Urba Biblioteko en Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI). Organiza Komitato kreskas, ĝi nun enhavas 3 personojn. Buĝetaj linioj konkretiĝas. Celoj preciziĝas danke al laborgrupo el Mark Fettes, Humprey Tonkin, Duncan Charters kaj mi.

-oOo-

Membroprizorgado

Nia kasisto Wiliam Harris laboras zorgeme kaj akurate, en proksima kunlaboro kun la vic-sekretario Magdalena Fejficova, kiu mastrumas la membroliston. La Koleg-helpa Kaso ebligas subteni la aliĝon de diversaj kolegoj. La estraro aprobis diversajn novajn proponojn. Aperis alvoko al subteno al ĝi.

-oOo-

Laboro de la estraro

La estraro konsistas el 9 personoj, la maksimumo laŭ la statuto. En la jaro 2014 ĝi jam rete voĉdonis 7-foje. Okazas glata kaj efika uzo de la retgrupo ILEI-nur-estraro kaj de la adreso ILEI-estraro-plus, kiu entenas diversajn pliajn personojn de ILEI, de UEA kaj TEJO. Mi kutimas konsulti la du vic-prezidantinojn Zsofia Korody kaj Xiao-feng Gong « Arko » ofte kaj ŝategas iliajn komentojn kaj sugestojn pri la vivo de la Ligo. Tio okazas antaŭ la konsulto de la tuta estraro.

Diversaj estraranoj propagandas esperanton kaj instruas ĝin en sia lando, kiel ĉiuj movadanoj. Tio estas ĝojiga en si mem, tamen tio fakte ne antaŭenirigas nian Ligon kaj ĝian mastrumadon, pri kio ni respondecas.

-oOo-

Kurso Esperanto Etape

Stefan MacGill prizorgas ĝin, verkas kaj enretigas ĝin. Enorma laboro.

-oOo-

Kontaktoj kun movadaj stabloj

La kontaktoj kun UEA kaj TEJO oftas kaj evoluas efike. Ni estas en diskuto pri la eblaj lokoj de la sekvaj kongresoj. Mi kunsidas kun ili aŭ persone kiel kun Lukasz Zebrowski en februaro en Varsovio aŭ per skajpo aŭ per aliaj retaj ebloj.

ILEI havas 15 partnerojn. En tiuj tri monatoj ni laboris kun Ilona Koutny cele al la lanĉo de la nova studperiodo de la postdiplomaj studoj en Universitato Adam Mickiewicz en Poznan, Pollando. Naskiĝis laborgrupo pri la mastrumado de la subvencioj de ESF kunlabore kun UEA kaj ILEI : ĝi konsistas el Katalin Kovats, Anina Stecay kaj mi. Daŭra kunlaboro okazas kun www.edukado.net kaj ĝia prizorganto Katalin Kovats. Nova kunlaboro komenciĝis kun la revuo *Esperanto*. Mi daŭre verkas diversajn artikolojn pri komunikado kaj instruado por diversaj gazetoj kaj revuoj.

ILEI havas reprezentanton ene de Komisiono pri Azia Esperanto-Movado KAEM : temas pri nia vicprezidantino Xiao-feng Gong « Arko ».

-oOo-

Kontaktoj kun ekstermovadaj stabloj

La LKK en Montevideo rilatas kun la urugvaja nacia Unesko Komisiono, same mi kun Unesko en Parizo.

Mi reprezentis esperanton en la Konferenco de ALTE en Parizo la 10-an kaj 11-an de aprilo.

-oOo-

Finaj rimarkoj

Mi daŭre vidas farenaĵojn kaj plibonigendaĵojn. Tamen mi havas la impreson, ke la ĉefaj aspektoj de la vivo de la Ligo evoluas pozitive.

Mi volas tre elkore danki ĉiujn personojn, kiujn mi citis en tiu raporto kaj aliajn, kiuj iel kontribuas al la vivo de la Ligo.

Mireille Grosjean, Nantes, Francio, 2014.04.15.

-oOo-

Se vi deziras korespondi kun gesamideanoj en Kubo, bonvolu kontakti Sinjoron Juan Carlos Montero en Medina per juancarlos@esperanto.co.cu

Por niaj karaj membroj

Grava informo :

En Les Brenets estas stoko da informiloj je via dispono.
--

« L'espéranto, la langue équitable »

« IRO Magazine » la revue des inventeurs, avec un article sur l'espéranto

« ILEI » informilo pri Eo kaj ILEI. Du versioj ekzistas : esperanta kaj angla ; esperanta kaj franca.
--

Bonvolu rilati kun Mireille Grosjean por ricevi la deziratan disdonotan nombron.
--

Tel: 079 69 709 66

mirejo.mireille@gmail.com
--

Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

Postfach 178, 4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

Venontaj kunvenoj :

Lunde 26-an de majo : Saint-Louis Babilado „La Fadeno“ ekde la 19a horo en la restoracio La Poste en Saint-Louis.

Ĵaŭde 26-an de junio : Monata kunveno en Grün 80 ekde la 19a horo.

Dimanĉe 24-an aŭ 31-an de aŭgusto : Ekskurso.

Lunde 25-an de septembro : Saint-Louis Babilado „La Fadeno“ ekde la 19a horo en la restoracio La Poste en Saint-Louis.

Ĵaŭde 23-an de oktobro : Monata kunveno en Riehenring 131: Babilado kaj ludoj.

Lunde 24-an de novembro : Saint-Louis Babilado „La Fadeno“ ekde la 19-a horo en la restoracio La Poste en Saint-Louis.

Ĵaŭde 27-an de novembro : Programo en Riehenring 131 ekde la 20h15.

Sabate 6-an de decembro : Zamenhofa festo en Svislando.

-oOo-

Genève

Esperanto-Grupo *La Stelo*
1200 Genève : lastelo@gmail.com

-oOo-

La Chaux-de-Fonds

Okaze de sia parolado dum la malfermo de la UK en Rejkjaviko la nova prezidantino de ILEI Mireille Grosjean emfazis la valoron de internaciaj renkontiĝoj en proksimeco, tio estas kun najbaraj landoj. Konsekvence kiel prezidanto de Svisa ILEI-Sekcio (SIS) ŝi devis ekagi.

La 26-an kaj 27-an de oktobro okazis Komuna Seminario de SIS en la lernejo "*La Grande Ourse*" en La Chaux-de-Fonds. Dudeko da personoj partoprenis, inter kiuj unu persono el norda Francio, unu el Parizo, du el Liono kaj du el Grenoblo.

Sabate okazis unue laŭstatuta Ĝenerala Asembleo de la Sekcio, poste prelego pri la pedagogio de Célestin Freinet praktikata en la privata lernejo "La Granda Ursino", kiun prezentis Anke Brower kaj Monika Molnar, la respondeculinoj de tiu stablo. Mireille Grosjean prezentis diversajn aspektojn de la lernhelpa efiko de esperanto.

Marion B elisle prezentis la fenomenon de alte dotitaj infanoj kaj la diversajn aspektojn de ilia lernado, evoluo kaj ensociiĝado. Komuna vespermanĝo ebligis konatiĝon kaj kontaktojn. Dimanĉe dekpersona grupo renkontiĝis kun Claude Gacond por vizito de CDELI. Posttagmeze dekpersona grupo vizitis la belegan Internacian Horloĝmuzeon de La Chaux-de-Fonds.

-oOo-

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo, Poŝtfako - Case postale 246 1000 Lausanne 22

Tel. : 076 411 14 55 kaj 021 647 29 28

esperanto@citycable.ch kaj www.esperanto.ch/Lausanne

Venontaj kunvenoj

Lunde 5-an de majo : Sarah kaj Sylvain Meigniez prelegos pri sia vojaĝo.

Sabate 28-an de junio : Jara ekskurso en Vicques (JU) organizita de Charlotte Blanc Maillard.

Lunde 1-an de septembro : Prelego de Andr  Cherpillod.

Lunde 6-an de oktobro : Programo decidota.

-oOo-

Neuch tel

Kreo de novaj esperanto-renkontiĝoj

Ekde oktobro 2013 troviĝas homoj en Neuch tel la unuan mardon de ĉiu monato por lerni kaj praktiki esperanton. La renkontiĝo komenciĝas pli-malpli je 18h45 per komuna vespermanĝo, kaj sekve okazas kurso aŭ alia esperanto-aktiveco laŭ la partoprenantoj.

Nuntempe tio okazas ĉe mi, **strato L on-Berthoud 8**. Ĝis nun ĉefe venas komencantoj, inter unu kaj kvar personoj, do mia kurso orientiĝas por ili, sed laŭ kiu venas, tio povas ŝanĝiĝi... Mi ankaŭ ĝojus foje havi aliajn spertajn esperantistojn, kiuj venos grandigi la grupon kaj eble prezenti ion.

Alia esperanto-vespero en Neuch tel okazas ĉiun lastan mardon monate en *Caf  des Langues*, de 18h30 ĝis 20h00. *Caf  des Langues (lingva kafejo)* estas lingvaj renkontiĝoj okazantaj en *Caf  du Cerf*, iu kafejo en la urbocentro.

Okazas tie praktikado de la itala, hispana, angla, germana, kaj ekde januaro 2014 ankaŭ de esperanto. Ne nepre necesas regi la lingvon bone por partopreni, kaj por la esperanta kunveno eĉ ne necesas paroli ĝin : Venas esperantistoj por iom paroli en esperanto, sed ankaŭ venas interesatoj, kun kiuj ni parolas pri esperanto en la franca aŭ alia lingvo.

 ar en tiu kafejo ne nur venas homoj, kiuj celas nian grupon, sed ankaŭ multaj aliaj lingvemuloj, estas bona okazo sciigi pri esperanto.

Vi trovos pliajn informojn pri la adreso kaj maniero aliĝi sur la facebook-paĝo de *Caf  des langues*.

Por partopreni iun aŭ alian el tiuj renkontiĝoj, plej bone skribu al mi.

Luc Allemand : luc.allemand@bluewin.ch

-oOo-

Wil

Esperanto-Klubo Wil

Verena Chaves –Walder, Rosenhügelstrasse 22, 9230 Flawil

Tel. 071 393 41 49, chaves-walder@bluewin.ch

Venontaj kunvenoj :

04.06.2014 : 50-JARA JUBILEO DE NIA ESPERANTOKLUBO WIL KUN FESTA PROGRAMO.

03.09.2014 : Niaj travivaĵoj en Esperantujo : klubanoj rakontas. Nia SES-prezidantino Mireille Grosjean raportas pri esperanto en Afriko.

03.12.2014 : Rakledvespero kun rakontoj kaj kantoj.

Ĉekomence ĉiam disvolviĝas nia rakonta rondo.

La kunvenoj komenciĝas je la 19 horo en b`treff , stacidomo de Flawil.

Antaŭĝojas pri vigla partopreno Verena Chaves-Walder

-oOo-

Zürich


Esperanto-Societo Zuriko

La 26-an de februaro okazis en la Centro Karolo la Granda en Zuriko la 110-a ĝenerala kunveno de la Esperanto-Societo Zuriko. Ĉeestis Elisabeth Eisenegger, Istvan Morocz, Milou Helga Obrecht, Dieter Roke, d-ro Carl Schick, Nelida Weidmann kaj Dietrich Weidmann. La ĝenerala kunveno akceptis adapton de la statuto, kiu fiksas, ke la estraro estonte estas minimume 3-persona. La oficantaj estraranoj reelektiĝis. Estis akceptita aldono de la sumo de Fr. 1000.- al la fondumo por la 1-a Svisa Esperanto-Junular-Kantokonkurso, kiu estos la ĉefa aktiveco subtenita de ESZ dum la jaro 2014. Estis decidita, ke denove okazos regule liberaj kunvenoj ĉiam la lastan ĵaŭdon de la monato en *Kafejo Mandarin* (apud la stacidomo Stadelhofen), Zuriko, kiam ne okazas alia evento.

La liberan kunvenon de la 27-a de marto partoprenis Nelida Weidmann, Dietrich Weidmann kaj André Müller.

La venonta renkontiĝo de Esperanto-Societo Zuriko okazos :
Ĵaŭdon, la 15-an de majo 2014, 19.00 : **Centro Karolo la Granda**, Kirchgasse 10, 8001 Zuriko. Dietrich Weidmann prezentos sciencan enketon pri la efiko de la frua instruado de la angla kaj franca lingvoj en la bazaj lernejoj de Zuriko.

-oOo-



Al kongresoj kaj vivo tuthomara

Intensivaj kursoj en Greziljono

Retejo: <http://gresillon.org/printempo>

Kontakto: kastelo@gresillon.org, +33-2.41.89.10.34, Maison Culturelle de l'Espéranto, Grésillon, St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ, Francio.

2014-maje-08/11 : Kantado de korusaro Interkant'.

2014-maje-11/17 : Rememoroj de malnovaj esperantistoj kaj iamaj gastoj de Greziljono. Rete : gresillon.org/s1

2014-junie-29/julie-06 : Turisma semajno, tuttagaj ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe la rivero Luaro kaj rezidejoj de renesancaj artistoj. Rete: gresillon.org/s2

2014-aŭg-01/09 : Sennacieca semajno kun kursoj, ekskursoj kaj prelegoj, antaŭ SAT-kongreso. Rete: gresillon.org/s3

2014-aŭguste-09/17 : Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj, SAT-Infankongreseto. Rete: gresillon.org/s4

2014-oktobre-24/novembre-01 : AŬTUNE, la komunaj ferioj por infanoj, familioj kaj geavoj.

-oOo-

Kvinpetalo en Bouresse

Kvinpetalo, 15 rue du Lavoir, FR-86410 Bouresse

informoj@kvinpetalo.org kaj www.kvinpetalo.org

organizas menciindajn kursojn kaj renkontojn, kiel ekzemple:

Staĝo pri tradukado de la 13-a ĝis la 17-a de majo
gvidata de Brian Moon, profesia tradukisto

Kie renkontiĝas diversaj lingvoj, ĉiam necesas tradukoj, sed bona regado de lingvoj kaj bona kapablo traduki ne ĉiam kuniras. Tradukadon necesas aparte ekzerci, kaj dum tiu ĉi semajno ni faros ĝuste tion, esperantigante francajn tekstojn plej diversajn. La celo estas tradukado altnivela, sed ankaŭ plibonigo de la lingva nivelo en esperanto, ĉar analizi tradukproblemojn povas konduki ankaŭ al lingvolecionoj. Partoprenantoj de diversaj lingvoniveloj estos do bonvenaj.

La kurso taŭgos ankaŭ por prepariĝi al la traduka parto de la **Atesto pri Supera Lernado** de Franca Esperanto-Instituto.

Promeni tra naturo kaj Vikipedio de la 11-a ĝis la 15-a de aŭgusto gvidate de Alain Favre, biologo

Tiu staĝo havos du aspektojn :

- Ni promenos en naturo kaj malkovros speciojn de vivuloj : plantoj, fungoj, bestoj, kaj ankaŭ interesajn mediojn.
- Ni verkos artikolojn por Vikipedio pri la sama temo, studante la jam ekzistantajn, kiujn eventuale oni povos plibonigi.

Venu do bone ekipite – ŝue, vestaĵe, kaj se eble komputile.

Tiu staĝo taŭgas ankaŭ por prepariĝi al la faka branĉo « Sciencoj kaj Tekniko » de la **Atesto pri Kapableco** de Franca Esperanto-Instituto.

-oOo-

47a ILEI-Konferenco en Montevideo, Urugvajo

19an ĝis 25an de julio 2014, ĵus antaŭ la Universala Kongreso.

Se vi ŝatas vojaĝi kaj kongresumi, nepre saltu al Sud-Ameriko en julio. Unue okazos tie la 47a ILEI-Konferenco, kiun gvidos Mireille Grosjean kiel prezidanto. Memore al la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en 1954, do antaŭ 60 jaroj, (tiam Unesko aprobis la unuan rezolucion favoran al Esperanto) nia Konferenco de 2014 okazos en Montevideo, Urugvajo. Komenco sabate 19an de julio. Vendrede de la sekva semajno la kongresemluloj veturos per buso (2hora veturado) al urbeto Colonia, mondheredaĵo de Unesko, kaj poste per ŝipo (2hora veturado) al Bonaero, Argentino, kie okazos la Universala Kongreso.

La ILEI-Konferenco interesas ne nur instruistojn. Okazas diversaj aktivecoj, prelegoj, debatoj, kursoj, ekskursoj kaj gustuma bonveniga vespero tre fama. Pripensu pri partopreno, vi certe ĝuos la etoson.

-oOo-

Pri la interlingvistika trijara kurso okazanta en Poznan

Se vi ŝatas interlingvistikon kaj esperantologion... tiam nepre pripensu pri aliĝo al la trijara kurso, kiu startos en septembro 2014 en Poznan, Pollando. Tiu kurso estas post-diploma kurso, do homoj kun iu universitata diplomo rajtas partopreni. Ĝi okazas en la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) sub la gvido de Dr hab Ilona Koutny. Dum 3 jaroj la gestudentoj (ili devas esti minimume 20) iras al Poznan por unu semajno en februaro kaj unu semajno en septembro. Interlingvistiko estas unu el la studobjektoj, kune kun fonetiko, gramatiko, literaturo, komunikado, kulturo, historio. Elstaraj profesoroj venas al Poznan por instrui.

« *Post ŝerco streĉo* » estas la titolo de la kolekto de ĉiuj miaj taskoj por UAM. Tio fontas el momento, kiam mi ŝerce diris : ĉu mi devas aliĝi, por ke la kurso okazu ? JES, diris Ilona Koutny. Mi aliĝis kaj la kurso startis en 2011 kaj finiĝos en septembro 2014 samtempe kun la lanĉo de la nova trijara periodo. Mi estas je dispono, se vi havas demandojn pri tiu aventuro.

En Svislando laŭ mia scio Monika Molnar studis dum tri jaroj en Poznan kaj akiris la finan diplomon. Sébastien Moret el Lausanne studas kun mi nun.

Mi kutimas entrajniĝi en Bazelo je la 18a horo 25 kaj vekiĝas en Poznan je la sepa matene. Tre agrabla vojaĝo ! Sébastien Moret kutimas veni aviadile, Poznan havas flug-havenon.

La studenta domo Jovita estas tre agrabla kaj proksima je la stacidomo kaj la universitato. Ĉion vi povas vidi sur mia blogo tajpante :

<http://mirejo3.blogspot.com/2013/10/poznan-uam.html>

Mireille Grosjean

-oOo-

Amikeco en ĉina Amikejo

Dieter Rooke, Wilderswil la 14-an de aprilo

Invititaj de Ŝanhaja Esperanto-Asocio, mia ĉindevena edzino Jun Liu kaj mi refoje vizitadis la landon, kiu konsideras sin Mezo de la Mondo.

En la jaro 1986 unuafoje mi ekkonis ĝin okaze de la 71-a Universala Kongreso. Kvankam flavbekula mi bone komprenis la esencan enhavon el la kongresparolado de H. Tonkin, la tiama prezidanto de UEA : „*Ni iru al la mondo – ne al familia rondo !*“

La 11-an de marto 2014 ni surteriĝis en la modernegan flughavenon de Pekino. La filino de mia edzino akurate atendis nin en terminalo. Ŝi kunportis du blankajn kontraŭ-polvajn maskojn. Ekster la konstruaĵo fakte grize pendis la ĉielo, apenaŭ ventetis, stagnis la aero.

Trioje ni enbusiĝis por atingi nian celon : la urbegon Tianjin. Ĉi tie loĝas miaj bogepatroj. Bedaŭrinde mi nur kapablas saluti per unusola ĉinlingva frazo : „*Mi tre ĝojas revidi vin*“ - La respondon mi bedaŭrinde jam ne plu komprenas !

Almenaŭ kun la pekin-rasa hundeto ne ekzistis komunika problemoj ! Ĝi freneze ŝvingadis sian voston !

Vespere ni iris al ĉina restoracio. Du pladoj allogis mian atenton : Unu konsistis el krizalidoj de silkaj raŭpoj, la alia el grandaj rostitaj lokustoj.

La sekvan tagon ni renkontiĝis kun mia filino. Ŝi laboras en luksa aŭto-agentejo. Pro sia beleco de manekeno ŝi facile kaj sukcese vendas veturilojn.

Vespere mi ĝisis mian edzinon por sole trajn-veturi al Ŝanhajo. Mia edzino deziris pasigi kelkajn tagojn kun siaj maljunaj gepatroj. En Ŝanhajo jam atendis min mia de multjaroj amiko Wang Minhao en la sudokcidenta elirejo de la stacidomo. Li jam perfekte faris planon por la tuta semajno !

Min ege impresis la dimensio de la urbego : En unu kvartalo loĝas pli da personoj ol

en tuta Svislando ! Oni nombras ĉirkaŭ 30 milionojn da loĝantoj en la areo de Ŝanhajo.

Konstante ŝanĝiĝas la urba aspekto. Malkonstruiĝas preskaŭ novaj domoj, por konstrui eĉ pli altajn. Sur alta etaĝdomo staras en latinaj literoj : „Kapital-lando“. La ĉinajn ideogramojn afable kaj pacience tradukis mia gastiganto.

Pro la modernigo de la stratoj foje mia amiko ne plu trovis la ĝustan vojon ! Feliĉe li senpene pridemandis lokanojn.

Wang Minhao vizitigis al mi la fremdlingvan universitaton, kie li dum multaj jaroj studadis la rusan lingvon. Li rakontis al mi pri la pasintaj studjaroj, kiam li loĝis kun kvar samĉambranoj.

Post diplomiĝo li ne trovis laboron kiel instruisto, ĉar tiam tumultis la kultura revolucio. Unu jaron li devige laboris en kamparo por konstrui digon. Lia edzino tiam devis labori en fabriko.

Sur alta kolono en universitata korto staras busto de Maŭ Zedong. En apuda kampo ludis korbopilkon studentaro.

Iun matenon ni vizitis parkon kun nomo Fuxing, ĉar tie situas la statuoj de Marks kaj Engels - miaj samlandanoj ! Iliajn vizaĝtraĵojn mi trovis iomete ĉinecaj – sed tamen rekoneblaj.

Ekster la kvazaŭfosilia ŝtonaĵo min ege ĝojigis la vigleco de la popolanoj : En improvizita diskoteko jam je la 10-a horo de la mateno maljunuloj kaj infanoj kune dancis. Sur alia herbejo ekzerciĝis *taj ĉi* gimnastikaĵoj. En angulo kolektiĝis kantemuloj por nostalgie kanti pri la ruĝa revolucio, pri pasinta amo aŭ lotusfloroj. La notoj estis skribitaj per ciferoj. Ĉiuj videble entuziasmadis.

En iom antikva kvartalo mi konatiĝis kun la historio de Ĉinio en iama aŭtenta loĝdomo de la burĝa revoluciulo Sun Yatsen. Videblis per fotoj la tragika sorto de la demokrata revolucio. Ĝi celis renversi la reĝimon de la lasta imperiestro de Ĉinio. Ĝi fiaskis kaj dronis en sango. Min aparte impresis en la ĉambroj la luksa meblaro, la burĝa stilo kaj la poligloteco de la revoluciulo, kiu havis multajn geamikojn eksterlande. Kiel erudiciulo li ankaŭ studis la verkaron de Karlo Marks.

En la sama kvartalo troviĝas la iama sidejo de la komunista movado en Ĉinio. En ĝi loĝis gvidanto de la Komunista Partio de Ĉinio : la revoluciulo Zhou en Lai. Li estis dumviva kamarado de Maŭ Zedong. La ĉambroj kaj meblaro multe pli simplas. Ili servis por la kunvenoj kaj unu apartamento ankaŭ por kaŝi persekutitojn.

Nur post la finfine sukcesa revolucio Zhou en Lai ankaŭ akceptis diplomatojn kaj altrangulojn el kapitalismaj landoj en tiu domo.

Mia amiko dufoje organizis kunvenojn kun lokaj esperantistoj. Du el ili estis ali-landanoj : junulo el Sankta Peterburgo nun programisto en Ŝanhajo kaj iranano estro de vojaĝ-agentejo. Ni amike babilis pri ĉio kaj nenio, pri idealo kaj realo de nia lingvo kaj malkovris la malsamecojn de niaj naciaj kulturoj.

Por ĉino estas nekonata la koncepto de labirinto, nesciata ties dilemo. Mi ricevis donace libron pri budhismo : Se mi savus formikon, tiam mi multe pli longe kaj ege feliĉe plu vivus !

Alian tagon, la 18-an de marto, akompanata de Wang Minhao mi vizitis libervolan Esperanto-kurson en la mezlernejo Xiangming.

Pro la iniciato de mia amiko tie ĉi ekzistas tiu kurso posttagmeza. La 30 knabojn instruas veterana esperantisto per kopioj el la *Junulkurso* – eldonita de SAT antaŭ preskaŭ 100 jaroj !

En unu leciono mirinde sidas pace kato sur hundo, la hundo kuŝas sur seĝo, kaj seĝo staras sur tablo! Ĉifoje la leciono temis pri la korpo-partoj. La instruisto pafis la vortojn al lernantoj, kaj ili devis ĥore ripeti ilin. Laŭ lia peto mi instruis per alia metodo : mi alvenigis knabon, kaj tiu devis tuŝi sian korpon kaj eldiri la ĝustajn nomojn de siaj korperoj.



En mezo de Ŝanhajo ni promenis tra homamaso turisma kvartalo. Unu butikoj post alia ofertas memoraĵojn. Mi sopiris je taso da kafo. Kune ni sidiĝas ĉe tablo kaj ĝuis kapuĉinon – pli favorprezan kaj pli bongustan ol en Svislando !

Vidalvide tra fenestro videblas longaj vicoj antaŭ manĝaĵet-budo. En ĝi manĝis antaŭ nelonge la prezidento de Ĉinio, Xi Jinping. Mi ne aĉetis la manĝaĵon, ĉar mi ne kredas, ke ĝi magie donus al mi bonŝancon !

En urbo Chang Zhou mi reenkontiĝis kun mia edzino en stacidomo. Ŝia hararo intertempe mirinde bukliĝis !

La sekretario s-ro Zhang Changshen de Ĉina Esperanto-Ligo bonvoleme invitis nin. En lia lernejo instruas koreano Hou Song la pentroarton kaj ankaŭ li donas esperanto-lecionojn al gejunuloj. Instruistino de la angla ankaŭ instruas esperanton al tre junaj infanoj. Ili ĉarme kantis por ni en klasĉambro. Ĉiu prezentis sin per aliaj vortoj, kiuj estis skribitaj sur granda tabulo. Ili malĝuste opiniis min mondfama stelulo. Tial mi senĉese skribis mian aŭtografon en kajerojn!

En lerneja korto atendis nin surprizo ! Verdaj arboj, floroj kaj plantoj ornamas slabojn kun esperanto-proverboj kaj sentencoj. De sur muro pendas portreto de Zamenhof.

La vespero konkludiĝis per tipe ĉina bankedo. Ĉiuj sidis ronde ĉe tablo kun turniĝanta vitra plado. Alterne alvenadas gekelneroj por alporti pli da apetitigaj ekzotaj manĝaĵoj. Laŭ al mi nekonata regulo iu leviĝas kaj eldiras toston : „Amikeco la plej grava !“



La 21-an de marto, matene, ni ĝisis nian karan ĉiĉeronon el Ŝanhajo. Per rapidega trajno kun nomo „Harmonio“– (ĝi veturas konstante je po 300 km hore) ni galopis al la urbo Zaozhuang. La vastega stacidomo troviĝas ekster la urbo, kiel kutime la flughavenoj. Feliĉe mia edzino trovis la ĝustan buson al la urbocentro, kaj facile ŝi trovis la menditan hotelon.

Alveninte ni tuj telefonis al la estro de la Esperanto-Muzeo, samideano Sun Mingxiao, kiu senprokraste afable akceptis nin ambaŭ. (Vidu tiurilate kolorfoton sur la lasta kovrila paĝo). Vespere ni atingis la imponan Esperanto-Muzeon, kiu troviĝas en universitata komplekso. Antaŭ pordo nin bonvenigis studentoj kaj distingita japana profesoro, kiu instruas al ili esperanton kaj la japanan.

La muze-estro videble tre fiere montris la eksponaĵojn. Post la enirejo lumis granda blua terglobo, post ĝi staris bronza skulptaĵo kun la kapo de Zamenhof. Kronologie eblis spuri la historion de esperanto en Ĉinio. Multaj gravaj politikistoj, sciencistoj kaj revoluciuloj esprimis sin favore al nia lingvo.

La muzeo estas multmedia : eblas spekti filmon, mem paroli per mikrofono kaj aŭskulti. Je dispono estas taŭge ekipita moderna salono por kolokvi.

Sur unu foto mi ĝoje trovis la vizaĝon de mia edzino, ĉar ŝi estis kunorganizanto de ILEI-konferenco en Tianjin !

Antaŭ la portreto de Zamenhof mi donacis al la Muzeo tri librojn : *La Kapitalo* de Karl Marks, la enciklopedion *Universalaj lingvoj en Svislando* de Andreas Künzli

kaj la jubilean festlibron *Instrui Dokumenti Organizi* honore al Claude Gacond.



La postan tagon frumatene ni ekaŭtis kun la gefiloj de la muze-estro al la ĝardeno Esperanto-Amikejo. Ŝoforis nin la ĉefo de la „*Esperanta Ĝardeno*“, samideano Sun Shoude. Fakte la „ĝardeno“ estas projekto tre ambicia. Ĝia areo kovras 6,6 hektarojn, pli granda ol la tiama „*Amikejo*„ en Moresnet!

Sur granda bildo mi admiris la planon. Sojle ĉe montara deklivo kelkaj familiaj domoj, parko kun fiŝlageto, ĝardeno kaj arbaro, en la centro giganta statuo de Zamenhof. Mia edzino kaj mi plantis pinarbojn, por prospera kresko mi akvumis ĝin (Vidu tiurilate kolor-foton sur la lasta kovrila paĝo). La ĉirkauaĵo videble estas tre seka. Mi deziras longan vivon al tiu ĉina kaj esperanta Amikejo.

Posttagmeze ni estis invititaj al uzino de konstrumaŝinoj. Tie estro tre favoras nian lingvon kaj mecenatas ĝin.

En grandan salonon li kunvenigis la personaron de sia entrepreno.

Unue alpaŝis la japana profesoro faronte prelegon pri la komparo de ekonomioj japana kaj ĉina. La prelegon simultane ĉinigis la muzeestro. Iu junulo prelegis ĉinlingve kaj Sun Mingxiao esperantigis lin.

Mi mem faris etan sinprezenton, kiun ĉinigis mia edzino.

Koreanino Zu Zuo Mu kapablis fari paroladon en la ĉina. Bedaŭrinde neniu interpretis ŝin esperantlingve.

Survoje al vespermanĝo mi renkontis feliĉan kokaron apud la personara restoracio. La kuiristo buĉis ilin kaj nia gaja kompanio frandis ilin. Kun ruĝa bongusta vino el Ĉinio ni ĝue ĉion englutis. La etoso varmiĝis, senbridiĝis la langoj.

La koreanino ekkantis la popolkanton el Italio *La kolombo blanka*, japana profesoro kuraĝis kanti ĉinlingve, kaj mi kantis pecon el la opero *Karmen*. Komune ni kantis la

tristrofan himnon *l'Espero*. Tiel solene fermiĝis nia amika rondo.



Fine en Pekino ni konatiĝis kun korifeo de Esperanto el Ĉinio, Samideano Li Weilun. Ni trovis lin en fremdlingva universitato. Kvankam nomebla veterano li elradias eternan junecon kaj mensan vigecon. Lia personeco ege similas al tiu de la lastjare forpasinta eminentulo Laulum, kiun mi siatempe intervjuis por la gazeto *Heroldo*. Mi demandis lin pri la sukcesa transformo de la ĉina socio kaj pri la kultura revolucio. Li respondis afable ĉiujn miajn demandojn kaj rakontis el sia tutmondeca vivo, ĉar multajn jarojn li loĝis ekster Ĉinio.

Ni kune serene disiĝis – ĝis revido en la ĝardeno Amikejo !

Dieter Rooke.

-oOo-

Rememorigo pri la venonta redakta datlimo de SES informas

Raportoj, sciigoj, artikol-proponoj estu senditaj al la redakcio ĝis la 10a de junio kaj la bulteno dissendiĝos meze de aŭgusto. Poŝta adreso : Claude Gacond, Chevreuils 14, 2300 La Chaux-de-Fonds. Retadreso : gacond@bluewin.ch .

Kulturaj paĝoj

Redaktas : Richard Schneller (rs), Rue Charles-Knapp 20,
2000 Neuchâtel, rischneller(ĉe)gmail.com.

Pri la enhavo kaj la stilo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

« Homoj sen vizaĝo »

(rs) Tio estas la titolo¹ de ĵus aperinta libro en la franca de Henriette Rémi. Temas pri reldono el la jaro 1942² kaj ĝi entenas la priskribon pri la travivaĵoj de la aŭtoro en germana milita hospitalo pri vizaĝkripluloj dum la unua mondmilito. Henriette Rémi estas pseŭdonimo kaj en la postparolo Stéphane Garcia esploris pri la vera nomo kaj malkovris, ke temas pri Henriette Ith³, iama konata esperanto-instruistino en Ĝenevo.

La familio

Henriette Ith naskiĝis en familio de horloĝistoj origine el La Sagne en la svisa Kantono Neuchâtel. La germanaspekta nomo Wille estiĝis pro eraro de naskiĝregistra oficisto en la 18-a jarcento de la franclingva nomo

Vuille.⁴ Henriette travivis feliĉan junecon, kvankam la patro Charles (1835-1896) mortis, kiam ŝi estis 11-jara. Ŝi ricevis severan edukadon fare de sia patrino Jenny, naskita Borkiewitz (1855-1940). La familio de liberpensuloj kun kvin infanoj vivis en medio intelekto kaj kulture stimula.

Studoj kaj profesio

Post la duagrada lernejo Henriette Wille perfektigis siajn lingvosciojn pri la germana kaj angla en Zuriko kaj Anglio de 1902 ĝis 1904. Sekvis studoj pri fotografiado en Berlino kaj malfermo de fotografia ateliero post ŝia reveno al La Chaux-de-Fonds en 1908. En ĉi tiu urbo ŝi edziniĝis en aprilo 1914 al germana aktiva oficiro, Hans Danneil, kun kiu ŝi vivis ĝis 1924, kaj tiel akiris la germanan civitanecon perdinte la svisan.

Unua Mondmilito

Pro la eksplodo de la unua mondmilito en aŭgusto 1914, la disigita paro revidis sin nur dum la forper-

¹ Henriette Rémi : Hommes sans visage. Genève : Slatkine, 2014.

² Henriette Rémi : Hommes sans visage ; préf. Adolphe Ferrière. Lausanne : Spes, 1942.

³ *Henriette Ith-Wille* naskiĝis la 31-an de aŭgusto 1885 en La Chaux-de-Fonds kaj mortis la 12-an de novembro 1978 en Ĝenevo. Ŝi estis svisa esperanto-instruistino kaj sekretario de la pedagogo Pierre Bovet. Ŝi engaĝiĝis por pacismo kaj instruado de Esperanto.

⁴ Stéphane Garcia : Postface historique, en : Henriette Rémi : Hommes sans visage. Genève : Slatkine, 2014.

mesoj de la edzo, kiu grave malsaniĝis en 1915 kaj translokiĝis al milit-lazareto ĉe la nordgermana urbo

Dankon al la historiisto Stéphane Garcia kiu, en sia gravega postparolo al la reeldonita novelaro *Hommes sans visage* de Henriette Rémi, malkovrigas al ni la neordinaran vivon de la esperantistino Henriette Ith-Wille.

Kiam fine de la pasinta jaro Stéphane Garcia ekkontaktis min por ricevi informojn pri Henriette Ith, vere malmulton pri ŝi mi kapablis raporti, krom ke ŝi deĵoris kiel esperanto-sekretariino de Pierre Bovet en ties Instituto Rousseau kaj kunaŭtoris la artikolon *Esplorado pri vortofteco en Esperanto kaj en aliaj lingvoj* aperintan en 1928 en *Internacia Pedagogia Revuo*. Dank' al la brokanta servo de CDELI mi povis liveri tiun dokumenton.

El miaj kontaktoj kun Henriette Ith, kiun Henri Vatré nomis onklino Henriette, mi nur povis mencii, ke CDELI estis ricevinta kelkajn rarajn dokumentojn, kiam ŝi devis forlasi

Verden (Aller), kie lia edzino vizitis lin.

sian apartamenton. Kaj mi konsilis la esploradon de la arkivoj de Pierre Bovet kaj de lia Instituto Rousseau.

Kaj fakte miraklan laboron efektivigis Stéphane Garcia. Jam post kelkaj semajnoj postparole al la reldono de la libro *Hommes sans visage*, li eksciigas al ni, ke malantaŭ la pseŭdonimo Henriette Rémi fakte kaŝiĝis Henriette Ith-Wille naskiĝinta en La Chaux-de-Fonds. Kaj dank' al la detalaj informoj, kiujn li alportas pri tiu eksterordinara virino, ni nun reale konatiĝas kun kuraĝa kaj multifaceta esperantistino.

Aĉet-instigilo al tiu libro akompanas *SES informas 2014-2* kaj ĉi-sekve artikolo de Richard Schneller certe instigos multajn legantojn de nia bulteno akiri verkon, kiu bedaŭrinde restos plene aktuala tiom longe, kiam revenos senvizaĝaj viktimoj el milit-konfliktoj.

Claude Gacond

Flegistino de vizaĝvunditoj

Dum la unua mondmilito Henriette Danneil okupiĝis pri vizaĝvunditoj en milita hospitalo, kie ŝia edzo estis flegata. Nur en la jaro 1942 ŝi publikigis rememoraĵojn pri tiu tempo.

Postmilita periodo

La militaj travivaĵoj instigis Henriette Danneil al filozofia meditado pri la senco de la vivo. Ŝi trans-

skribis la libron de Rudolf Eucken⁵ *Der Sinn und Wert des Lebens* (La senco kaj valoro de la vivo) al Brajlo. En 1919 ŝi aliĝis al la Internacia Junulara Ligo (Internationaler Jugendbund, IJB) iniciatita de profesoro Leonard Nelson en Göttingen. La politika filozofio de Nelson devigis la IJB-anojn al partopreno en

⁵ *Rudolf Christoph Eucken* (1846-1926) estis germana instruisto kaj filozofo, Nobel-premiito en 1908.

politika partio kaj Henriette Danneil iĝis membro de la Socialdemokrata Partio de Germanio, sed la partio eksigis ŝin en 1925, kiel cetere ĉiujn IJB-anojn. Intertempe, en 1924, ŝi translokiĝis al Ĝenevo, kie de kvar jaroj ekzistis la Ligo de Nacioj kaj tie ŝi restados dum 54 jaroj.

Ĝenevo

En ĉi tiu urbo Henriette Danneil konservis la rilatojn kun Leonard Nelson kaj la Internacia Junulara Ligo, kiu intertempe transformiĝis al Internacia Socialista Batalligo (Internationaler Sozialistischer Kampfbund, ISK), kaj ŝi fondis kaj vivigis ties ĝenevan ĉelon.

La paco per Esperanto

En 1926 Henriette Danneil, jam trilingvulo, lernis Esperanton kaj poste instruis ĝin en la Lernejo de socialaj studoj por virinoj. Ŝi konatiĝis kun Edmond Privat, redaktoro de la revuo *Esperanto*. La nomo de Henriette Danneil ofte aperis en ĉi tiu revuo rilate la ĝenevan esperantogrupon « La Stelo ».

La Nova Edukado

Henriette Danneil pere de sia amikino Alice Descœudres konatiĝis kun la reprezentantoj de la Nova Edukado: Edouard Claparède kaj Pierre Bovet⁶, kiuj fondis en 1925 la

⁶ *Edouard Claparède* (1873-1940) estis svisa neŭrologo kaj psikologo. Li ĉefe interesiĝis pri la infana psikologio, la instruado kaj studado de la memoro. – *Pierre Bovet* (1878-1965) estis svisa pedagogo, psikologo kaj esperantisto. Li

Internacian Oficejon pri Edukado (Bureau international d'éducation, BIE). Ŝi membriĝis en tiu oficejo, kiu federigis multnombrajn movadojn de la Nova Edukado, kaj instruis Esperanton al la personaro por faciligi la organizadon de la Tutmonda Kongreso de Edukado, kiu okazis en 1929 en Ĝenevo. Ŝi instigis al tradukado de la asocia *Bulteno*, kiun ŝi tradukis dum kelkaj jaroj per mona helpo de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE).

Sekretario de Pierre Bovet

Pierre Bovet dungis Henriette Danneil kiel sian personan sekretarion en la Instituto Jean-Jacques Rousseau kaj por la Internacia Oficejo pri Edukado. Ŝi instruis esperanton ankaŭ al infanoj por scienca observado. Por Henriette Danneil la Nova Edukado kaj Esperanto entenas ambaŭ la ĝermojn de estonta socio pacigita. Kiel Maria Montessori⁷ ŝi kredis, ke daŭra paco estiĝos pli per edukado de la individuaj mensoj ol per la povo de la ŝtatoj.

Adolphe Ferrière

En 1926 ŝi konatiĝis kun Adolphe Ferrière⁸, la antaŭparolonto de ŝia libro *Hommes sans visage* (Homoj sen vizaĝo), kiu estis redaktoro de la

estis direktoro de la Pedagogia Instituto Jean-Jacques Rousseau en Ĝenevo.

⁷ *Maria Montessori* (1870-1952) estis itala reformpedagogo.

⁸ *Adolphe Ferrière* (1879-1960) estis svisa pedagogo, unu de la fondintoj de la movado Nova Edukado.

revuo *Pour l'Ere Nouvelle* (Por la Nova Erao). Dum tri jaroj ŝi estis lia redakta sekretario. Ŝi tradukis la libron de Ferrière *Transformons l'école* (Ni transformu la lernejon).⁹ Alia traduko ŝia estas *Senarmigo kaj edukado*, kiu aperis okaze de la Monda Konferenco por Senarmigo dum la jaroj 1932-1934 en Ĝenevo.

Engaĝiĝo porlaborista

Henriette Danneil transprenis de 1928 ĝis 1932 la redaktadon de la esperanta versio de *isk*, organo de ŝiaj germanaj socialistaj amikoj en Göttingen, kaj aktivis ankaŭ en la loka laborista movado. Tamen ŝi diskrete ne subskribis siajn artikolojn, ĉar laŭ la oficialaj instancoj ŝi estis germanino kun limigita restadpermeso kaj riskus ekzilion pro siaj kontaktoj kun membroj de ISK. Por ŝia edziniĝo kun Hans Danneil en 1914, la konvinkita liberpensulino akceptis religian baptiĝon, sed la nunan dilemon ŝi solvos per... reedziniĝo.

Nova kunulo kaj kunbatalanto

Kun Emile Ith (1902-1965) Henriette formis rimarkindan paron: eksedzino de prusa oficiro, konsiderata kiel enmigrantino en sia propra lando, kaj Emile Ith, sviso dek sep jarojn pli juna ol ŝi, ekzilito el la Kantono Vaŭdo, kiu ĵus eliris malliberejon, en kiu li restis dum ses

⁹ Estonta eduko: alvoko al gepatroj kaj eduk-estaroj. Adolphe Ferrière, trad. Henriette Danneil (antaŭparolo de Edmond Privat). Genève: Universala Esperanto-Asocio, 1929.

monatoj pro militrifuzado! Emile Ith estis ebenista laboristo, kiu akordigis siajn farojn al siaj ideoj kaj favore impresis sian kunulinon. Li estis sindikatano, liberpensulo de anarkiista tendenco. La psikanalisto kaj verkisto Charles Baudouin¹⁰ vizitis Emile Ith en la malliberejo kaj sub ties influo Emile kaj Henriette Ith komencis studi psikologion kiel liberaj studentoj en la Universitato de Ĝenevo. La iama laboristo iĝis intelektulo kaj engaĝis sin kun sia edzino Henriette persisteme dum pluraj jardekoj pri pacismaj agadoj, neperforto kaj la enkonduko de civilservo en Svisio kun ties ĉefa iniciatinto Pierre Céréssole¹¹.

La « spirito de Ĝenevo »

Henriette Ith membriĝis en diversaj pacismaj movadoj en la internacima Ĝenevo, kiu kredis je « nova erao », kiu disvastigus por la tuta mondo veran kulturon de paco kaj neperforto, inter aliaj en la Movado Internacia de Repaciĝo. Laŭ instigo de kelkaj amikoj (Monastier, Céréssole, Privat, Butts) ŝi frekventis ankaŭ la Societon de Amikoj (Kvakerojn) kaj interesiĝis pri Gandhi kaj la india filozofio, kiuj interesis ankaŭ la kontribuantojn al la roman-

¹⁰ *Charles Baudouin* (1893-1963) estis franca psikanalisto kaj verkisto. Lia praktiko de terapeŭto kondukas lin al prikonsidero de la respektivaj kontribuoj de Sigmund Freud, Carl Gustav Jung, Alfred Adler kaj siaj propraj malkovroj.


¹¹ *Pierre Céréssole* (1879-1945) estis svisa inĝeniero. Li konatiĝis ĉefe kiel pacisto, prokonscienca militrifuzanto, kvakero kaj fondinto de la Internacia Civilservo.

dia periodaĵo *L'Essor* (La Impeto), ŝiajn konatulojn kaj amikojn Bau-douin, Bovet, Claparède, Descœu-dres, Ferrière, Monastier, Privat.

« **Homoj sen vizaĝo** »

La komenco de la dua mondmilito en 1939 rememorigis al Henriette Ith la travivaĵojn de la unua mondmilito kaj ŝia flegado de senvizaĝaj kripluloj en germana lazareto. Ŝi surpaperigis la tragikan situacion de ĉi tiuj soldatoj, kapvunditoj pro kugloj, grenadaj aŭ obusaj splitoj, kies retroviĝo kun familianoj estis ŝoko por ambaŭ, ĉar la kripligitaj vizaĝoj apenaŭ ebligis rekoni la vunditan samfamilianon. La estonto de ĉi tiuj militkripluloj estis preskaŭ senesperaj kaj ili sentis sin senutilaj. Post konsiloj de Adolphe Ferrière, kiu pretis verki antaŭparolon en la libro *Hommes sans visage*, ŝi repliblaboris la manuskripton, kiu fine aperis en 1942 sub la pseŭdonimo

Henriette Rémi. En 2014 ĉi tiu libro reeldoniĝis kun ampleksa postparolo de Stéphane Garcia, kiu situas ĝin en la kunteksto de la tempo.




Aldonaĵoj

Menu-mendilo.

Esperanta-franca ILEI informilo.

Instigilo al aĉeto de „*Hommes sans visage*“ en via libro-vendejo.



En Ĉinio geedzoj Dieter Rooke kaj Jun Liu ĉe la Esperanto-Muzeo kaj plantantaj pinarbojn ĉe la Ĝardeno Amikejo.

